

Ora Ĵurnalo

Numero 53, Aŭgusto 2022



Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo.....	2	La motorciklo de Espoir	20
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Nescio de la angla povas esti multekosta en Svedio	21
Espeporko meditas.....	3	Den stora saknaden – La granda manko.....	22
Letero de bona observanto.....	4	La Aŭstria nacia biblioteko ricevas arkivon pri Esperanto.....	24
Somera kurso en Gotenburgo.....	4	La familio Winberg en Bengtsfors, okcidenta Svedio.....	25
Invito al "ESPERANTO sur la strando"	5	Se vi intencas starigi paroligan realan kurson aŭ zoom-kurson	32
Somera kurso de EAF (Esperanto Asocio de Finnlando).....	6	Ideo pri proverboj.....	33
Finna somermezo	7	Ĉu vi volus aŭskulti tutan libron en delikataj pecoj?.....	34
Ekskurso kun birdobservantoj sur la fervojtaluso	7	La Esperanto-klubo de Lubumbaŝo dankas.	35
Jan Hellström ne nur fotas birdojn, sed ankaŭ florojn.....	8	Koncerto kun "World Music Culture Club" ĉe Nääs.....	35
Ho, kia bangĝoj!	9	Pliaj pioniraj virinoj	36
Maro.....	9	Vakcinado de Aira Kankkunen	39
La rajto de la fiŝo	10	Urbopromeno en Gotenburgo kun Ingegerd kaj Lasse Granat.....	41
Ŝatataj kaj ne ŝatataj insektoj	10	Albumo de urba promeno en Gotenburgo 16 julio 2022.....	42
Pristimantis gretathunbergæ, rano de Greta Thunberg	10	Inbjudan till ZOOM-kurser	45
La 117-a Skota Kongreso en Dunfermline....	11		
BET 56 en Litovio.....	15		
En la ĵus aperinta gazeto Västsahara	19		


Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68, Lerum.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@gmail.com. Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuaĵojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.





Espeporko meditas



- 🌸 **Iun tagon en julio ni ricevis multe da poŝtkartoj** senditaj al membroj de la familio Winberg en Bengtsfors de esperantistoj diversloke. Mi miras ke estis tiom da kontaktoj antaŭ ol Interreto ekis.
- 🌸 **Kursoj kaj kongresoj** diversloke plenumas ĉi tiun numeron. Ĉu homoj nun sentas ke la pandemio estas for? Ne tute. Novaj virusoj ekas, tamen ne same danĝeraj kiel en la komenco. La vakcinadoj ja mildigas la simptomojn.
- 🌸 **Lernado de Esperanto povas aspekti diversmaniere.** Deirpunkto povus esti proverboj, kreitaj por instrui nin vivi kune. Lauri Rytkönen havas ideojn. Trovu ilin en ĉi tiu numero! Ankaŭ ZOOM-kursoj indas. Oni ne bezonas longajn vojaĝojn por atingi kursejojn. Someraj kursoj estas alia koncepto. Stano Marček malavare donas al ni eblecon aŭskulti sonlibrojn. Li mem estas la leganto de multaj klasikaj libroj.
- 🌸 **En la librorondo** pri "Sur bluaj planedoj" ni diskutas pri la minacoj kontraŭ nia nuna vivo. Ĉu la monda loĝantaro kreskos aŭ malkreskos? Ĉu ni vivos kun pliaj ciferecaj iloj? Ĉu planktono estos la sola ponto por proteino? Ĉu la mikroplasto, kiu troviĝas ĉie, negative influos la fekundecon? Ĉu ni elmigros al aliaj planedoj?
- 🌸 **Kortuŝa estas "La granda manko"**, kiu temas pri junaj afganoj, kiuj estas

resenditaj al sia hejmlando post gimnaziaj studoj kaj eĉ laboro ĉi tie. Estas kruele unue doni al ili esperon pri nova vivo, kaj poste tamen resendi ilin al danĝera vivo en lando el kiu ili fuĝis. Aliaj landoj ŝajne estas pli malavaraj, ekz. Francio.

- 🌸 **Ĉu ni iru al la aŭstria biblioteko** por havi inspiron kiel organizi nian bibliotekon en Stannum? Eble ne, ĉar oni ne povas kompari la grandecon en Wien kun kelo en Stannum. Tamen ni pli kaj pli bonigas nian ejon kaj ĝi estas ja facile atingebla por ni en Gotenburgo. La stoko de noveldonitaj libroj devas kreski.
- 🌸 **Por kelkaj insektoj ni konstruas hotelojn**, por aliaj ni detruas iliajn nestojn. Abeloj, burdoj kaj papilioj havas altan statuson, sed por vespoj ni ne havas kompaton.
- 🌸 **Espoir en DR Kongo aĉetis motorciklon kiel laborilon.** Kiom multe da nutraĵoj li povas ŝarĝi sur ĝin? Multege! Kaj la vojoj ne ĉiam estas ebenaj. Unu el la kandidatoj por UK 2024 estas Tanzanio. Espoir esperas ke UEA elektos tiun landon.
- 🌸 **Nova studsezono venos** kun novaj defioj kaj ĝojoj. Fortigu vian animon per naturbildoj de Renate Säfström, profesia fotisto, kaj per bildoj de pluraj amatoroj.
- 🌸 **Koran dankon pro ĉiuj kontribuoj!**
/Siv

Letero de bona observanto

leginte *Ora Ĵurnalo* numero 52

La 9:an de julio 2022

Saluton Ĵurnalo n:o 52:n!

De kelka tempo mi legas la revuon "Ora Ĵurnalo" kaj ĝi pli kaj pli plaĉas al mi pro interesa enhavo. Sur la paĝo 19 estas foto de birdo – merlo. Sed probable ĝi ne estas merlo, laŭ mia scio pri birdoj ĝi estas **kantoturdo**.

Antaŭ nelonge ankaŭ mi observis katon kaj birdojn. La kato akiris siajn ungojn gratante arbon. Kaj venis multnombro monedoj kaj unu sturno kaj ĉiuj kriis, kriaciis. (Probable sur tiu arbo estis nestoj). La kato rigardis ilin ne

kompreneble kaj foriris, kaj la birdoj trankviliĝis. Tute certe senpezige ili enspiris kaj kontrolis siajn nestojn.

Mi bedaŭris, ke mi ne havis fotilon por ĉio ĉi filmeti.

Mi kore salutas la redaktantojn de tre interesa revuo.


Amike,
Dorota Burchardt el Pollando



Koran dankon, Dorota!

/ La redaktantoj de Ora Ĵurnalo

Somera kurso en Gotenburgo



La lastan tagon ni iris al Trädgårdsföreningen por manĝi kaj babili kaj trovi respondojn al la kvizo, farita de Ingegerd.

Post interrompo pro la pandemijaj jaroj ni denove spertis someran kurson en Gotenburgo 20–23 junio. 21 personoj kolektiĝis en la kursejo de Vuxenskolan, studronda organizo. Por la unua fojo ne troviĝis komencantoj. Sten Svenonius havis

gramatikan kurson, Inga Johansson daŭrigan kurson kaj Andreas Nordström konversacian kurson. Dum la matenaj kunvenoj mi prezentis librojn el la esperanta literaturo, pensante ke post la kurso oni ja mem edukiĝu per legado.



Kantoj ankaŭ havas lokon en kursoj kaj mi konstatis ke la "somera koruso" bele sonis. Ĉi tiun jaron ni havis gaston el Stokholmo – Soile Lingman. Ŝi ĵus partoprenis en esperanta kurso en Turkuo (Åbo) en Finnlando. Ŝi rakontas pri ĝi en ĉi tiu numero de Ora Ĵurnalo.

Kursanoj demandis ĉu troviĝas esperantaj libroj kun grandaj literoj.

Post sugesto de Ann-Louise Åkerlund mi skribis al Stano Marček kaj ricevis ekzemplon de sonlibroj. Stano malavare sendis liston, kaj mi

elektis "La Verdkata Testamento" de Raymond Schwartz por Ora Ĵurnalo. Koncerne librojn kun grandaj literoj mi trovis du – se mi ekskludas kelkajn infanlibrojn: "Arne la ĉefido" de Leif Nordenstorm kaj "Sur bluaj planedoj" de Laure Patas d'Illiers. La lasta ni nun legas en la librorondo per Zoom.

Kion ni do deziras por la 2023:a somera kurso?

1) komencantojn 2) eksterlandanojn, kiuj paroligos nin. /Siv



Invito al "ESPERANTO sur la strando"

Ĉi tiun fojon temos pri: Spuroj de scienculoj en Gdansk

Kiam? 8–11 septembro 2022

Kie? Gdansk/Sopot

Ni sekvas la famajn scienculojn: Fahrenheit, Hevelius, Kluver.

Trovu informojn sur nia retpaĝo kaj fejsbuka paĝo:

<https://www.facebook.com/ESPERANTO.TROJMIASTO>

www.esperanto-sopot.pl

Amike!

Paulina



Somera kurso de EAF (Esperanto Asocio de Finnlando)

en Turku/Åbo 9–12 de junio 2022

Por Soile Lingman, nia gasto el Stokholmo, la gotenburga kurso estis jam ŝia dua somera kurso. Jen ŝia rakonto:



Soile Lingman

La kurso okazis en la Civitana Instituto Aurala en Turku/Åbo. Ni estis 12 partoprenantoj dividitaj en tri grupoj depende de la lingva nivelo. Ni estis tri komencantoj en la unua grupo kaj tri en la konversacia grupo. Al tiu lasta apartenis Andreas, mi kaj finna junulo Vilho, kiu planas fariĝi astronomo. Dum la 1900-aj jaroj oni havis du konatajn astronomojn parolante esperanton en Turku, Yrjö Väisälä kaj Liisi Oterma. Vilho do estos la tria eminentulo.

Ni havis tri instruistojn dum la kurso, inter alie juna hungaro, Sabi Szilva, loĝanta en Pollando. EAF kutime havas unu eksterlandan instruiston dum siaj someraj kursoj, kiuj okazas diversloke en la lando.

Tri partoprenantoj loĝis en la gasthejmo de Birgitta-fratinoj meze de la urbo. Estas trankvila loko kun modestaj prezoj kaj matenmanĝo enkalkulita.

Kvankam mi aĉetis buskarton por la semajno, mi trovis ke oni pli rapide atingis la kursejon promenante. Trovi la diversajn bushaltejojn

estis malfacile pro tio, ke oni dum pluraj jaroj fosis la vendoplacon por konstrui aŭtoparkejon sub ĝi. Por mi kiel vidhandikapulo estis problemo ke la vojoj por piedirantoj estis malebenaj kaj ke bicikloj kaj elektraj veturiloj rajtas veturi tie.

Vespere ni vizitis vidindaĵojn kiel la miljaran Katedralon, muzeon Aboa Vetus kaj muzeo de Väinö Aaltonen, la riverbordojn de Aura kun multaj pontoj kaj la ŝipeton Föri, kiu veturigas trans la rivero.

Estis vere vigla vespera vivo ĉe la riverbordo de Aura kie ni vespermanĝis trifoje. La kursgvidanto Tiina Oittinen bedaŭrinde estis malsana dum kelkaj tagoj. Ŝi estas la motoro de la aktiva klubo en Turku kaj estas ankaŭ sekretario de EAF. La nova prezidanto de EAF estas Juha Metsäkallas, kiu elektiĝis ĉi jare post Tuomo Grundström.



Mi ofte vizitas eventojn kiel VT kaj AT en Finnlando. Por mi estis granda plezuro nun partopreni someran kurson en Turku, ĉar estas mia naskiĝurbo. Mi ja komencis la unuan klason tie en la jaro 1943.

Soile Lingman en junio 2022

Finna somermezo

Salutojn de Raita "Saliko" Pyhälä, kiu pasigas sian someron en la orienta insularo de la Finna Golfo, en origine svedlingva regiono sed nun pli ol duone finnlingva.



Ekskurso kun birdobservantoj sur la fervojtaluso inter Stannum kaj Olofstorp

Plej ofte GOF (La gotenburga ornitologa asocio) aranĝas matenajn ekskursojn. La 16an de junio la ekskurso tamen komenciĝis je la 21a horo. La startpunkto situis ĉe la "fervoja stacidomo de Stannum" – kiu nun ekzistas

nur kiel nomo de la bushaltejo. La gvidanto, Andreas (la dua de maldekstre en la bildo), rakontis pri sia iama Stannum, vilaĝo, kiu iam estis vigla kaj homplena.



La kampara regiono prosperis post kiam la Västrogotia fervojo konstruiĝis fine de la 19a jarcento. En junio 1900 la unua vaportrajno iris inter la urboj Gotenburgo kaj Skara. La tiama reĝo Oskar II inaŭguris la novan fervojon.

Dum multaj jaroj la vojoj en Gråbo estis malbonaj. Oni pli facile marŝis sur la fervojo – se oni havis "irbileton". Kiam trajno alproksimiĝis kaj sonsignalis oni ja saltu flanken.

Stannum iam havis tri (!) nutraĵvendejojn samtempe sed nun neniu vendejo troviĝas tie – krom lignaĵvendejo. Unu ŝildo de unu iama vendejo – Jonssons Livs – restas. En ties kelo

nun la biblioteko de la gotenburga esperanto-societo troviĝas.

Nuntempe la aŭtobusoj al Gotenburgo iras sufiĉe ofte. La iama fervojo, nun sen reloj, havas lokon por vagantoj, biciklistoj, mopedistoj – kaj ĉevalrajdantoj. La lastaj disponas duonan metron de ne asfaltita parto de la vojeto. Griza kato akompanis nin kelkan kilometron. Verŝajne ĝi ankaŭ ŝatis birdojn. /Siv (kiu ankaŭ fotis)



Jenajn birdojn ni aŭskultis:

Monedo (kaja), ringokolombo (ringduva), blanka motacilo (sădesărla), herbejpipio (ăngspiplărka), griza mevo (fiskmăs), flava emberizo (gulsparv), grenkanbirdo (kărrsångare), kampalaŭdo (sånglărka), verda kardelo (grönfink), ruĝgorĝulo (rödhake), blankgorĝa silvio (törnsångare), kukolo (gök) kaj kampopasero (pilfink). (Jan Hellström tradukis la birdnomojn esperanten.)

Jan Hellström ne nur fotas birdojn, sed ankaŭ florojn



Blâeld – ekio

Vild palsternacka – sovaĝa pastinako



La tago komenciĝis kun pluvo, sed poste la suno kaj venteto venis de la maro kiam estis tempo por promeno ĉirkaŭ la Vada Maro en Torslandaviken. La loko estas interesa pro kaj siaj birdoj kaj plantoj. Mi elektis du fotojn de blua ekio kaj sovaĝa pastinako. Burdoj kaj papilioj havas multajn florojn por viziti.

Birdoj notitaj: i.a. nigrabrusta grebo (svartsnäppa), ruĝbeka grebo (rödbena), marĉa parulio (kärrsnäppa), pli granda bordpipio (större strandpipare), pli

malgranda bordpipio (mindre strandpipare), hematopo (strandkata), tufa vanelo (tofsvipa), arĝentmevo (gråtrut), griza mevo (fiskmå), griza ansero (grågås), kantalaŭdo (sånglärka), korvo (korp), platbeka anaso (gräsand), kantcigno (sångsvan), sturno (stare) kaj ringkolombo (ringduva).

Papilioj: urtika papilio (näselfjäril), kardopapilio (tistelfjäril) kaj admiralo (amiral).

(Siv tradukis esperanten.)

Komento: pli facile ekzameni florojn, kiuj restas starante ol birdojn, kiuj rapide forflugas. /Siv

Ho, kia banĝojo!

De Renate Säfström



Vidu la pli grandan marbordan pluvion!



Maro

poemo de Barbro Lindgren

Maro
ondoj
ondoj
mevoj
ŝtonoj
fulmantaj
lanternoj
maro

ĉielo
ondoj
ondoj
brilaj ŝtonoj
fulmantaj lanternoj
maro
ondoj
ondoj



Foto: Ingegerd Granat.

La rajto de la fiŝo

de Germaine Hoffmann (el Beletra Almanako, junio 2021)

Neniu
proklamas
vian rajton
fiŝo
ridindigita fiŝo
kun petroselo
en la buŝo

Hieraŭ
eleganta
naĝakrobato
hodiaŭ
rigida
en mia
maladhera pato

Sur viajn
brulvundojn
mi ŝmiros molan
buteron
freŝan kremon
kaj mi kovros
ilin
per
rostitaj migdaloj



Bildo el Pixabay

Ŝatataj kaj ne ŝatataj insektoj



Ni finis la lurajton por tiuj gastoj. /Ingegerd



Ni konstruis hotelojn por aliaj insektoj. Ĉi tiuj
trovitaj en Lerum apud la rivero Lerån. /Siv



Pristimantis gretathunbergæ, rano de Greta Thunberg

estas specio de rano en la familio
Craugastoridæ, indiĝena al Panamo. Ĝi
estas nomita honore al klimata aktivulino
Greta Thunberg (informas Vikipedio). Inga
proponas ke ni sendu la esperanto-
lernolibron Grodan (La rano) al ŝi.



La 117-a Skota Kongreso en Dunfermline

de la 27a ĝis la 30a de Majo, 2022

(raporto de Riksablo)

Laŭ la organizantoj, la Skota Kongreso de Esperanto havas pli da jaraj re-okazoj ol io tia en Esperantujo. La ĉi-jara evento estis la 117a. Ĝi okazis en Dunfermline, je la 27a ĝis la 30a majo.

<https://skotlando.org/kongreso-2022>


La gastiga hotelo nomiĝas "City Hotel". Tiu fakto provis temon por diskuto inter la fruaj alvenintoj, ĉar nur tri-kvar tagoj pli frue, kiel aspekto de la festadoj pri sia 70-jara regno, Reĝina Elizabeth ordonis, ke Dunfermline estu oficiale "city". Ni angloparolantaj iom baraktis klarigi la senco de tiu levigo en rango al aliaj Esperantistoj. En Esperanto "urbo" povas signifi aŭ "town" aŭ "city" en la angla. Do, se Dunfermline estis nur "urbo" antaŭ nia alveno, kiel ni priskribu ĝian novan (supozeble pli altan) staton? Ĉu "urbego"?

Ne, ĝi enhavas nur 58 500 loĝantoj. Ĉu "civito"? Ne, ĝi ne estas sendependa politika estaĵo. Ĉu "burĝejo"? Nu, tio ne kunportas nuancon de plialtiĝo.

Fakte, Dunfermline jam de 1975 estis oficiale "reĝa municipo" ("royal borough") kaj ekde ĉ. 1070 ĝis 1437 ĝi estis la ĉerfurbo de Skotio. Do la afero ne gravas, kvankam tiu lingva demando ebligis tion, ke ni partoprenontoj povis vekti la Esperantlingvajn nervoĉelojn en niaj cerboj.

Unua Vespero

Post akcepto mi iris al mia ĉambro. Sufiĉe spacplena, kaj kontentiga al mia unua rigardo. Post registriĝo kaj bonveno, ni manĝis bufede (kun sufiĉaj senviandaj elektoj, bono laŭ mi) kaj poste kunvenis por kvizo. La kvizkreinto, Agneau Belanyek, faris vere bonpensitan kvizan. Li donis al teamoj



Abatejo de Dunfermline, de turisma broŝuro, welcometofife.com

de 2–4 homoj ne nur demandojn sed ankaŭ respondojn. Kial tio ne bagatele facilas? Unue ĉar ni ricevis komence ne ĉiujn respondojn kun iukaze pli ol unu ekzempleron de kelkaj respondoj. Due, do, ni devis interŝanĝi niajn ekstrajn respondojn (kiuj estis glubildoj por afiksi al niaj respondaj formularoj). Aldone, ĉiuj respondoj havis ian konekton al Dunfermline aŭ almenaŭ al Skotio. Lerte konstruita ludtasko, laŭ mi. (Ne, mia teamo ne venkis.)

Dua Tago – Osto, Bunkro kaj Bankedo

Post matenmanĝo mi piediris en malgranda grupo al preĝejo nomita laŭ Sankta Margareta, reĝino de Skotlando.

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Margareta_de_Skotlando_\(sanktulino\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Margareta_de_Skotlando_(sanktulino))

En kapelo de tiu preĝejo troviĝas relikvejo, kiu enhavas ŝultra osto de tiu sanktulino. Tie ni lernis diversajn interesajn faktojn pri ŝia vivo, ekzemple, ke ŝi naskiĝis en suda Hungario, kaj estis nepino de antaŭ-Normanda reĝo de Anglio. Ni ankaŭ aŭdis de preĝejano iom pri la longa vagado de ŝia kadavro, sankta relikvo, tra Eŭropo dum jarcentoj da religiaj konfliktoj. Nuntempe, la plejparto da restaĵoj de ŝia korpo kuŝas proksime al Madrido, en la monaĥejo de Escorial.

Laŭ mia opinio, la dua tago enhavis tri aliajn menciendajn spertojn, du pli kontentigaj ol antaŭatenditaj, unu malpli. La matena parolado de Agneau Belanyek, ne nur lerta kvizkreinto sed ankaŭ sperta prelegisto, temis pri "anekdotoj el instruista vivo". Interesa kaj ofte amuza rakontado pri pensinstigaj okazaĵoj en la kelkfoje stranga mondo de brita edukado, de bazlerneja nivelo al universitato.


Tagmeze ni veturis aŭtobuse al St. Andrews, laŭdire la hejmo de golfludo. Ni tagmanĝis tie en pica restoracio. La manĝo estis bongusta, sed ne alvenis tre rapide. Por konstati elektojn de pli ol tridek manĝontoj, per miksaĵo de Esperanto, la angla kaj la pola, kaj kompreneble kromspico de la itala, bezonas iom da tempo, fakte multo da tempo. Mia ĉefa kialo por aliĝi la vojaĝon al St. Andrews estis viziti, postlunĉe, la skotan "sekreta nuklea bunkro". Tio estas profunda kaverno, kiu estintus centralo de la brita/skota registaro se okazintus nuklea milito. Nun ĝi estas turistlogejo.

<https://secretbunker.co.uk/>

Lastatempe mi verkis etan poeziaĵon (kiu aperos/aperas en OĴ), kiu traktis interalie temon de kontraŭbomba bunkro por malmultaj altranguloj. Pro tio mi deziris sperti la internon de tia bunkro en vivo krom en imago. Sed, domaĝe, nia lunĉo daŭris tro

longe, kaj tial ne restis sufiĉa tempo por vizito al la sekreta bunkro. Anstataŭe, ni vagis en St. Andrews, universitata urbo (alia "reĝa municipo") kun multaj historiaj aspektoj. Ĝi estas marborda urbo kaj mi vizitis la plaĝon, kie kelkaj infanoj plaŭdvadis en la maro.

https://eo.wikipedia.org/wiki/Sankta_Andreo



Skota sekreta bunkro, turisma broŝureto.

Post reveno al Hotel City, okazis la bankedo. Per hazarda sorto (aŭ ĉu mi devas danki al Sankta Andreo aŭ Sankta Margareta?) mi ricevis plenajn rekompencojn por mia frustrigo pri la bunkro. La manĝoj ja plaĉis al mi, sed la ĉefa bonŝanco estis tio, ke mi sidis apud la invitita gasto, Douglas Chapman, membro de la brita parlamento je tiu distrikto. Li estas ano de la Skota Nacia Partio. La konversacio inter mi, li kaj aliuloj ĉe la tablo vagis dum kelka tempo sufiĉe

agrabla, ne tuŝinte specifajn politikajn temojn ĝis, pro kialoj perditaj el mia memoro, mi menciis libron kun titolo "The Athenian Option" (La Atena Elekto). Nu, mia propra obsedo estas "sortition", la plia enkonduko de hazarde elektitaj civitanoj en politikajn decidprocedojn. La menciita libro, de Anthony Barnett kaj Peter Carty, proponas reformon de la brita ĉambro de lordoj per aldono de plimulto da hazarde elektitaj civitanoj. Laŭ mi, tio estus grava paŝo al pliboniĝo. Je mia surprizo, Douglas Chapman ŝajnis entuziasme konsenti kun tiu ĉi vidpunkto. Alia surprizo estis, ke li ŝajne neniam antaŭe renkontis tiun libron, kaj

dankis min pro la sciigo. (Ja tio surprizas, ĉar ĉe la retejo de la Skota Nacia Partio, oni povas trovi tekstojn, kiuj forte subtenas uzadon de civitanaj asembleoj – kun partoprenantoj hazarde elektitaj de la loĝantaro – por doni konsilojn al la registaro.)

Nu, mi konfesas, ke ni uzis nek Esperanton nek la skotan gaelan por tiu agrabla diskutado. Jes, ni devis paroli en la angla. Tamen eĉ se tio estas iom krokodileca, mi tre ŝatas la ideon, ke mia hazarda seĝloko provokis parlamentanon agi pli aktive por movoj en direkto al pli plena demokratio. Mi esperas, ke tiu konkludo ne estas tute imaga.

Tria Tago – Riĉegeco, Algoritmoj kaj Abrikota Kareajo

Dimanĉe, dum libertempaj horoj mi povis viziti la naskiĝdomon de Andrew Carnegie, kiu dum kelkaj jaroj ĉirkaŭ 1900 estis la plej riĉa homo en la mondo. Nun ĝi estas muzeo.

<https://www.carnegiebirthplace.com/>

Mi alte rekomendas viziton al tiu loko por iu, kiu troviĝas proksime al Dunfermline. Notinda estas la malvasta spaco en kiu li kaj liaj gepatroj devis labori, ĉefe kiel teksistoj, dum la junaĝo de Andrew. La malsameco inter tiu kaj lia posta vivmaniero estas frapanta.

Mi aĉetis tie libron pri lia vivo kaj per tio lernis, ke li starigis fonduson celanta al internacia paco (CEIP).

<https://carnegieendowment.org/>

Tuj mi pensis: kial la Esperanto movado ne havas fortan ĉiutagan ligan kun tiu organizaĵo? Evidente ni estu aliancanoj, ĉu ne? Poste mi pensis: en pli ol jarcento tiu organizaĵo ne atingis internacian pacon, do ĉu indus pli proksima kunlaboro? Nu, tamen, eblas, ke ambaŭ organizaĵoj povus atingi pli kune ol aparte.

Post tiu vizito Agneau Belanyek regalis nin per alia pensiga prelego, pri la roloj de



Naskiĝdomo de Andrew Carnegie, de Wikipedia.

algoritmoj en la ĉiutaga vivo de preskaŭ ĉiu. Li klarigis, ke la vorto "algoritmo" tre ofte estas uzata en malrigora senco, plejparte kiam oni devus paroli simple pri komputila programo. Malgraŭ tio, algoritmoj/programoj vole-nevole ludas pli kaj pli gravajn rolojn en niaj vivoj. Krome, oftege ili estas tute kaŝitaj. Ni tute ne rimarkas nian dependecon – ĝis ia paneo.

Vespere, Hju Rid, kongresa ĉeforganizanto, kondukis nin, kiuj restis dum la tria nokto, al sia dua plej-ŝatata restoracio en Dunfermline. La unua devas esti vere mirinda, ĉar la duan mi taksis bonega. Tiu nepala restoracio nomiĝas Apricot (abrikoto). Se vi malsatos en

Dunfermline, serĉu la Albikoton! Sendube, la kuniĝo tie de agrabla etoso kaj bongusta

manĝo estis elstara sperto de la kongreso por ĉiuj, kiuj partoprenis.

Kvara Tago – Pontoj kaj Mevoj



Forth Fervoja Ponto, el Wikipedia.

London okazis postkongresa ekskurso. Ni veturis aŭtobuse al boatkajo proksima al South Queensferry kaj enŝipiĝis sur turisman pramŝipon. La ŝipo rondiris sub la tri famaj pontoj super la riverbuŝo Forth, spektebligante kelkajn aliajn vidindaĵojn, ekzemple, Dalmeny House kaj la mararmea doko ĉe Rosyth, kie lastatempe konstruiĝis du grandaj aviadilŝipoj.

Ni eĉ povis vidi la kastelon de Edinburgo. Laŭ mia opinio, la pinto de tiu rondvojaĝo estis surtera periodo sur la insulo Inchcolm. La insula nomo, laŭdire, devenas de "inish columba" en la gaela, t.e. la insulo de Sankta Kolombo, la sanktulo kiu alportis la kristanan religion al Irlando kaj Skotlando.

Sur la insulo ni trovis malmulte da kolomboj, sed grandegan nombron da mevoj. Estis la ovkova sezono, do la mevoj estis agrese protektemaj. La vartistoj de la insulo kaj ĝia abatejo donis al ni bambuajn bastonetojn. Kial? Por svingadi super niaj kapoj dum ni vagis laŭ la krutaj padoj inter ovplenaj nestoj, kaj tiel malkuraĝigi plonĝatakojn per la mevoj el aero sur niajn kapojn! Mi unufoje sentis frapon sur mian bastoneton, sed ne vidis la supozeblan birdon, kiu provis peli min for de

sia nesto. Tamen mi ja vidis rezulton de alian birdan plonĝatakon: turisto, el Indonezia, laŭ mia diveno, perdis sian tartanan ĉapon, supozeble memoraĵon de Skotlando. Dank' al agresema mevo, ĝi falis sur krutan deklivon super la maro, kie repreno estus malsaĝe riskplena.

Tiu ĉi ekskurso ege plaĉas al mi. Kvankam la abatejo estis fermita al la publiko pro riparbezono, mi ĝuis spekti la amindumadon de du ostrobirdoj. La birdo, kiun laŭ mia inferenco estis vira, ne sukcesis atingi sian celon (inferenco el vira, ne birda vidpunkto) sed la intrigo distris min, dum kvaronhoro dum ni atendis la revenon de la pramŝipo.

Bonŝance, la vetero indulgis nin: la vento nur blovetis, do la marsupraĵo preskaŭ platis, kaj ni sentis apenaŭ gluteton da pluvo. Poste, adiaŭoj – al aliaj kongresanoj, al Skotio, kaj al Esperantujo. Provizore.

Entute, mi taksas la eventon sukcesa. Gratulon al la organizintoj kaj la alia partoprenantoj. (Ĉu ankaŭ dankon al la

koncernaj sanktulo kaj sanktulino?) La programo sufiĉe sed ne tro plenis, la ĝenerala etoso estis agrabla, kaj mi ĝuis multajn okazojn por praktiki kaj plibonigi mian parolokapablon en Esperanto. (Laŭ mia propra juĝo mia lingvokapablo altiĝadis dum la unuaj tri tagoj, sed poste mia cerbo strikis kaj ĝi "falas el klifo" je la lasta tago – iomete kiel tiu perdita tartana ĉapo!)

/ Riksablo



Mevoj, el Wikipedia.



BET 56 en Litovio

Raita Pyhälä resumas:

Baltiaj Esperanto-Tagoj okazis en la litova urbo Klaipeda 9–17 julio 2022. BET ĉiam estas pli intima evento ol la Universalaj Kongresoj, precipe se oni loĝas en studenta hejmo kun aliaj esperantistoj. Vespere oni ariĝas en la komuna kuirejo por kanti, manĝeti, trinki, drinketi kaj babili. La prezoj ne estas altaj por ekzemple finno, kia mi. En mia urbo loka busvojaĝo kostas 3 eŭrojn, en Klaipedo 1 eŭron kaj por gemaljunuloj 50 aŭ 20 cendojn depende de la aĝo. Kia avantaĝo!

Klaipeda estas la tria plej granda urbo de Litovio, loĝantaro ĉ. 154 mil, germana nomo Memel kaj la esperanta Klaipedo. Ĝi situas en okcidenta Litovio, ĉe la marbordo, ĝuste apud la komenco de la Kurŝa terlanga, kie ni tuttage ekskursis. Ni vidis pinaron, dunojn, ne rajtis piediri sur ili, ĉar tio igus la sablon amase flugadi kaj endanĝerigi vilaĝojn kaj ĝardenojn. Ni piediris laŭ la pado al la Monto de sorĉistinoj, kie staras okdeko da lignaj popolartaj skulptaĵoj pri litovaj legendoj kaj fabeloj, ni vizitis la muzeigitan somerdomon de Thomas Mann (li tie pasigis tri somerojn), lernis pri la ventoflagoj, per kiuj oni antaŭe identigis ŝipojn kaj boatojn. En la fino oni montris al ni kormoranojn kaj ni povis legi



pri ties utileco. Dum la ekskurso venis sciigo pri la forpaso de Sigi Kivistö, finna agema esperantisto estondevena. En aliaj tagoj la duontagaj ekskursoj kondukis al la malnova urbo aŭ japana ĝardeno.

Ĉiuj programeroj krom en la tago de la solena inaŭguro okazis en la tereno de la Universitato de Klajpedo. Estis agrable piediradi de konstruaĵo al konstruaĵo, ĉio estis facile videbla kaj alirebla. En la herbejo kreskis ne nur herboj sed naturaj floretoj por burdoj, abeloj kaj aliaj insektoj. En la studenta manĝejo ni povis avantaĝe matenmanĝi kaj lunĉi ĉe grandaj komunaj tabloj. Gejunuloj plenigis niajn telerojn per bongustaj, simplaj litovaj pladoj, kutime oni elektis nur, ĉu fiŝaĵon aŭ viandaĵon. Ĉiam salato. Saĝa decido ne disponigi sukeron, kaj ne multa sukero en la desertoj kaj bakitaĵoj.

Al ĉiu partpreninto LEA donis utilan kaj informoriĉan Libron por BET-ano (148 p.) En la listo de aliĝintoj troviĝas 238 nomoj el 30 landoj kaj pliaj troviĝas en la BET-gazeto Lumturo, kiu aperis en ok tagoj. Ĉiuj numeroj estas rete legeblaj en la interretaj paĝoj de LEA. Tamen evidentiĝis, ke la aliĝintaj rusoj ne povis veni, kaj iliajn prelegojn kaj koncertojn litovoj devis anstataŭigi per aliaj. La renovigita programo ĉiutage aperis en Lumturo, kiun redaktis Choe Taesok. Ĉio iris glate. BET 56 estis bonege organizita.

En la riĉa Libroservo videblis granda stoko de aĉetindaĵoj. Ĝi estis malferma de la mateno ĝis vespero ĉiutage. Samloke surtable ekspozicio pri famaj esperantistoj, kiuj ne plu estas inter ni. Mi iom bedaŭris ke mankis la nomoj de la fotitoj, ĉar ne ĉiujn mi konas.

Ĉiuvespere okazis koncertoj aŭ teatraĵoj. Anjo Amika, Georgo Handzlik, Saŝa Pilipovic', Sepa kaj Asorti. Krome Edgars Piŝĉikas violone ludis sian propran muzikon komponitan por nova disko. Mikaelo Bronŝtejnon oni povis vidi kaj aŭdi per ZOOM. Post la solena inaŭguro barokan kaj nunan muzikon prezentis loka

kvinteto de latunaj instrumentoj. Mi ne povis ĉeesti en la Internacia vespero, ĉar mi flugis hejmen antaŭ ĝi.

En la traduka ateliero de Istvan Ertl la tradukemuloj elesperantigis tekston en siajn gepatrajn lingvojn. Istvan Ertl konsilis kaj korektis surbaze de sia scio pri dudeko da lingvoj.

En la Scienca Universitata Sesio (SUS) aperis i.a. Prezidanto Duncan Charters de UEA, Profesoro Ilona Koutny el la pola Universitato Adam Mickiewicz (al kies Esperanto studoj ŝi instigas nin aliĝi), Amri Wandel (pri spacteleskopoj), Manfred Westermeyer (biodiverseco, marĉoj), Alfred Heiligenbrunner (imunsistemo), Carlo Nicola Colacino (gravitaj ondoj), Bruĉjo Kasini ("30 Oraj horoj", pri instruado de Eo en superaj lernejoj en Italio). La prelegoj aperas en aĉetebla IKU/SUS-libro. Okazis multaj pliaj prelegoj, ekz. Ulrich Bradenburg (Esperanto kaj daŭripovo), profesoro Ilona Koutny (lingvaj aferoj en 5 prelegoj). Ŝi instruas ja en la pola Universitato Adam Mickiewicz, al kies Esperanto studoj ŝi instigas nin aliĝi. Aida Ĉižikaite interese rakontis pri la sezonoj kaj tradicioj litovaj samtempe montrante fotojn. Same Grazyna Opulskiene plukonatigis nin kun pliaj litovaĵoj per fotoj. Margarita Zelve el Latvio prelegis pri sialandaj 4 granddamoj poeziaj. Tuomo Grundström el Finnlando rakontis pri du famaj finn-estoninoj Aino Kallas kaj Hella Wuolijoki.

Ĉiujn prelegojn simple ne eblis enigi en mian tagan programon, sed mi volas speciale mencii d-ron Gediminas Degesys, kiu prelegis pri filozofio kaj Afriko. Li intencas daŭrigi pri la temo Afriko en la venontjara BET en Latvio. Li estas filozofo, poligloto, poeto, esperantisto kaj instruas en la Vilna Universitato. Dank'al li Esperanto disvastiĝas inter la studentoj kaj ni havis dekduon da gejunuloj en la BET. Li eldonis lernolibrojn kaj

vortarojn. Lia ESLI 2022 vortaro enhavas ĉ. 40 mil vortojn.

Kompreneble okazis ĉiunivelaj lingvokursoj. Oni rajtis mem taksi kaj elekti sian nivelon sed ankaŭ ŝanĝi al alia grupo. La instruistoj estis Aida Čižikaite, Nina Petuchovska, Mikaelo Linetskij, kaj Dalia Pileckiene.

Baltiaj Tagoj en Klaĵpedo tre plaĉis al mi kvankam mia vojaĝo tien daŭris 10 horojn. Usonano fanfaronis ke lia vojaĝo daŭris 20 horojn. Tamen ni opiniis, ke tio indus.

Raita "Saliko" Pyhälä

Ĉiuj programeroj, krom en la tago de la solena inaŭguro, okazis en la tereno de la Universitato de Klaĵpedo.



La universitato.



La inaŭguro:



Velŝipo sur rivero Dane.

BET – Studenta manĝejo + studenthejma komuna kuirejo

fotis: Raita Pyhälä



Bona etoso kaj interparoladoj en la studenta manĝejo kaj studenthejmaj kuirejoj.



BET logis junulojn! (Bildoj el la BET-gazeto Lumturo N-ro 5, 13.7.2022.)

VÄST SAHARA

En la ĵus aperinta gazeto Västsahara (Okcidenta Saharo), ties redaktoro, **Lena Thunberg**, skribas.....

La 24-an de junio, ĉirkaŭ 2 000 afrikaj migrantoj provis transiri la barilon ĉe la limo inter Maroko kaj la hispana enklavo de Melilo sur la afrika kontinento. Inter 23 kaj 37 migrantoj laŭdire mortis, laŭ raporto de



Internacia Amnestio "Melilla – neniam plu" la 28an de junio. La hispana polico laŭdire transdonis vunditajn kaj mortintajn al la maroka polico sen iu ajn enketo por konstati la identecon aŭ bezonon de protekto de la

migrantoj. Pluraj el la migrantoj laŭdire estas rifuĝintoj el Sudano kaj Malio.

Sur la maroka flanko, la korpoj de la mortintoj devas esti haste entombigitaj sen ajna identigo aŭ nekropsio por esplori la kaŭzon de morto. Sekve, parencoj ne estis sciigitaj, por ke ili povu enterigi siajn parencojn. Vunditaj migrantoj laŭdire estis mortpikitaj kaj batitaj fare de la maroka polico. Dum la printempo, Hispanio ricevis 120 000 ukrainajn rifuĝintojn. La hispana ĉefministro Pedro Sánchez, kiu antaŭ kelkaj semajnoj subite deklaris akceptebla la plano de Maroko por Okcidenta Saharo, unue laŭdis, ke la migrantoj estas haltigitaj ĉe la landlimo. Kiam la nombro da mortintoj iĝis konata, li indikis la mafion kiel la kulpulon.

Sed kiu lasis homojn morti sur la tero sen taŭga kuracista atento? Kiu transdonis potencialajn rifuĝintojn el Melilo al la maroka

polico sciante, ke ili estos mistraktataj? Kiu fermas la oficejojn pri azilo kaj rifuĝintoj en Melilo, sciante, ke tio ne estas maniero serĉi protekton en Hispanio, se vi venas el Sudano aŭ Malio, krom per risko de morto saltante la barilon?


De kelkaj jaroj EU pagas grandajn sumojn al Maroko por ke ĝiaj aŭtoritatoj haltigu migrantojn survoje al EU tra Hispanio. Maroko uzis ĉi tiun kalkanon de Aŭhilo kontraŭ EU plurfoje, kiam EU estis faronta decidojn, kiuj ne konvenis al Maroko.

La aŭtonomia plano de Maroko signifas, ke Okcidenta Saharo fariĝus provinco en Maroko sen ke la okcidenta sahara loĝantaro rajtus ekzerci sian, laŭ UN, laŭleĝan rajton al memdeterminado kaj sendependeco.

Lena Thunberg

www.vastsahara.net

La motorciklo de Espoir



Eble vi ekmiros ekscii kiel potenca estas la motorbiklo, kiun eble vi uzas por promeni aŭ iri ien iacele, sed ne imagis ĉu krom tio la motorbiklo povas fari plian laboron!

En Kongo-Kinŝasa la motorbiklon ni povas nomi supertaksio. Motorbikloj plenplenas en la trafiko, ili povas porti sur si maksimume kvar homojn (plenkreskuloj) kaj povas ĝis sep infanoj, danĝere, sed ebla. La ŝoforo sidas meze sur la motorbikla seĝo, ses infanoj malantaŭ li kaj unu sidas kontraŭ lia brusto sur ĝia benzinujo. Ĝiaj amortiziloj estas tiel fortoj, ke povas rezisti kontraŭ lurdaj pezaj. En Lubumbaŝo en la trafiko plenplenas du modeloj de motorbikloj: TVS kaj BOXER, tiu lasta estas pli malforta ol la unua, post unu laborplena monato ĝi ekfumas kaj malfortiĝas, tiam ĝi fariĝos konstanta gasto ĉe mekanikisto. La unuan modelon TVS ni nomas labormaŝino. Ĝi estas longa, fortega kaj longviva.

Krom en la trafiko, ĝi laboras ankaŭ en transportado de pakaĵoj pezaj, ĝi eltenas ĝis 200 kilogramoj.

Por transporti la pakaĵojn ni ligas ilin per elasta ŝnuro por ne moviĝi, sed antaŭ ĉio ni starigas la motorbiklon sur ĝiaj du piedoj por ekvilibro, kaj poste zorgeme ekmetas la pakaĵojn sur ĝin en ordo por kunligi per ŝnuroj elastaj. Vi povas vidi sur la bildo, mi estas sur motorbiklo, kie mi ŝoforigas: sep 25-kilogramajn sakojn da maizfaruno, kvar kartojn da biskvitoj, kvar 24-botelajn pakojn da suko kaj pliajn aferojn. Mi veturigas tiujn varojn tra distanco de kvar kilometroj sur vojo plena de fosaĵetoj.

Motorbiciklaj ŝoforoj plej preferas veturigi varojn, ĉar gajnas pli ol tiuj kiuj atendas klientojn por veturigi. Sed tiu okazo ne oftecas ĉar ni dependas multe de kioskaj vendistoj kiuj aĉetas la varojn.

La bona stato de la motorbiklo tamen dependas de kiel oni zorgas pri ĝi: ŝanĝi regule motoroleon, purigi ĝian filtrilon, glitigi iujn movajn partojn de ĝi.



Espoir NGOMA KASATI



Nescio de la angla povas esti multekosta en Svedio



Jen artikolo el *Upsala Nya Tidning* (gazeto), prenita el *Språkförsvaret* (La Lingva defendo).

Smart Parkering Sweden AB monpunas 83-jaran viron pro nekompreno de la angla.

En la *Upsala Nya Tidning* la 14an de julio estis skribita pri Kurt Grahn, 83-jara, kiu vizitis sian edzinon en la hospitalo kaj samtempe ricevis monpunon pro parkado.

La kialo estis, ke li ne komprenis la mesaĝon "declined" (malakceptita) sur la parkkvitanco (pri kio la Lingva Defenda Servo rimarkis), t.e. ke la pago ne estis trapasinta. Ĉar li ne studis la anglan en bazlernejo, tio neniel estis stranga.

Ŝajnas ke eskapis al *Smart Parkering Sverige AB*, ke ne ĉiuj svedoj fakte studis la anglan. La angla kiel la unua deviga fremdlingvo estis

efektivigita en publikaj lernejoj ĉie en Svedio nur en 1956.

Kurt Grahn diplomiĝis el la sepa grado sen studado de la angla. Tamen, li kompreneble komprenis la sumon, 93 SEK, sur la parkumada kvitanco kaj tial supozis, ke la pago trapasis.

Tio rezultigis ke li estis monpunita, sed li estis fakte punita pro siaj mankaj kapabloj en la angla. Li vane provis klarigi la cirkonstancojn al *Smart Parkering Sverige AB*, sed nur ricevis pretformulitajn frazojn kiel respondon.

Nek *Upsala Nya Tidning* ricevis signifan respondon de la parkkompanio, kiam la redaktoroj provis atingi la firmaon.

Laŭ la Sveda Lingva Defendo, estas anstataŭe *Smart Parkering Sverige AB* kiu devus esti monpunita, ĉar la sveda estas la ĉefa lingvo

en Svedio, dum la angla tute ne havas oficialan statuson.

En sia nescio – aŭ aroganteco – *Smart Parkering Sweden AB* supozas, ke ĉiuj svedaj civitanoj scipovas la anglan.

Estas facila afero konstrui parkad-kvitancojn

en la sveda aŭ kaj en la sveda kaj la angla.

La estraro de Lingva Defendo, La Lingva Defenda Reto

<http://www.språkförsvaret.se/sf/>
sprakforsvaret@sprakforsvaret.se
sprakforsvaret@yahoo.se

Den stora saknaden – La granda manko



La granda foresto – la granda perdo

Internacia Tago de Rifuĝintoj 2022

La 20-an de junio 2022, la artisto Marit Törnqvist metis 500 manskribitajn tabulojn sur Mynttorget en Stokholmo. "La granda perdo" volas atentigi ĉiujn tiujn, kiuj estis bonvenigitaj por peti azilon en Svedio sed poste finiĝis en kaptilo de longaj atendtempoj, laŭleĝe necertaj decidoj, novaj taksoj pri la aĝoj kaj ŝanĝitaj leĝoj. Kiuj estis deportitaj aŭ fuĝis al aliaj landoj en Eŭropo por eviti deportadon. Kiu ne povis vivi. Ĉiuj, kiuj ne ricevis la protekton, kiun ili bezonis.

En 2015, 163 000 homoj petis azilon en Svedio. Granda nombro da rifuĝintoj, multaj neplenaĝuloj, fuĝis de la milito en Afganio. Ili estis bonvenigitaj, lernis la lingvon, iris al lernejo, fondis amikecojn kaj iĝis parto de svedaj familioj. Sed por multaj el ili, la tempo en Svedio signifis neniun sekurecon.

14 ekzemploj el entute 500 tekstoj

1. *Ali*. Vi estis malkaŝe samseksema kaj prelegis en lernejoj pri kiel esti afgana kaj samseksema. Vi estis minacata de viaj samlandanoj. Sed la Sveda Agentejo pri Migrado asertis, ke vi elpensis tion nur por resti en Svedio. Vi fuĝis al Francio. Tie vi ricevis azilon pri rifuĝinto-statuso ĉar vi estis samseksema.

2. *Kien vi iris*

Mohammad? Vi estis tiom streĉita de malfacila vivo, sed vi amis prizorgi plantojn. Kiam viaj tomatoj maturiĝis, vi jam estis deportita. Ni neniam plu aŭdis de vi.



3. *Ni sopiras vin Ashiq*, virina aktivulo kaj filino de interpretisto por ISAF. La talibano proponis al vi du jarenspezojn sed vi ne


ricevis azilon. Vi fuĝis en aŭg. 2020 post kvin jaroj en Svedio. Tiam vi estis fininta vian tutan SFI (la sveda por enmigrintoj). Nederlando tuj elektis vin pro la 'Dublina konvencio' kaj donis al vi azilon pri rifuĝintostatuso.

4. *Mankas nia familiano, Asef*, kiu post 5,5 jaroj ĉi tie estis forpelita. Jen lia studenta grado, lia konstanta laboro, du infanoj, kiuj nomis lin granda frato – kaj sistemo, kiu estas tute rompita.

5. *Abbas*. En la aŭtuno de 2020, vi devis fuĝi. Denove. Post kvin jaroj en Svedio. Unu semajnon poste, via filo faris siajn unuajn paŝojn, sen vi apude. Vi mankas.

6. *Jawad*. La preĝejo estis via dua hejmo. Vi amis Jesuon. Mi estis ĉe via bapto. La plej feliĉa tago de via vivo. Mi adiaŭis vin en la deponejo. Vi estis deportita al Afganio. Estis la plej malĝoja tago de mia vivo.

7. *Ahmad, kara Azizam*. Vi havis koramikon ĉi tie en Svedio. Fine, vi povus ami tiun, kiun vi volis sen esti mortigita. Sed la Sveda Agentejo pri Migrado ne kredis je via amo. Vi denove devis forkuri senhalte por savi vian vivon. Nun vi loĝas sub ponto en Parizo. Via koramiko estis deportita reen al Afganio. Neniu aŭdis pri li dum pluraj monatoj. La talibanoj verŝajne ne konsideris lin mensoganto.



8. *Fratino*. Vi faris ĉion por savi la infanojn. Super la montoj kaj la maro. Kio okazis al vi estis senfunda doloro. La vortoj povas esti

prononcitaj nur kiel flustro. Vi demandis: Ĉu virinoj estas homoj en Svedio? Mia respondo sentis vanta. Vi devis daŭrigi la fuĝon. Mi portas vian ridon kaj viajn larmojn. Iun tagon vi estos libera, fratino.

9. *Milad*. Via jako ankoraŭ pendas en la halo. Nun vi kaŝas vin de la talibanoj en Kabulo. Kiam via LMA estus renovigota, vi estis arestita kaj deportita. Oni nomis vin kontraŭleĝa. Por mi, vi ĉiam estas nur HOMO.

10. *Amata Ahmad*. Kun la kapo mallevita kaj manko de konfido, vi fuĝis pluen. Nenio, kion ni faris, povus helpi vin. Nun vi telefonas el tendaro en Parizo kaj rakontas pri misuzo kaj memmortigaj pensoj. Kaj vi petas helpon. Deziras ke vi estus ĉi tie.


11. *Bona, amata N*. Vi estis nia dua "pruntfilo" kaj translokiĝis hejmen al ni kiam vi iĝis sendokumenta en 2017. Vi estis malakceptita, denove malakceptita kvankam vi estis GLATQ-ulo. Iun tagon vi ne venis hejmen. Vi estis prenita de GräPo (limpolico), arestita kaj deportita al Afganio. Tri tagojn poste, vi estis trovita morta, verŝajne mortigita de la talibanoj. Ni amas vin kaj sopiras vin. Restu en paco, kara N.

12. *Plej kara Latif*. De la vendreda komforto sur la kanapo ĝis la soleco en la tendo. Post kvin jaroj en Svedio kaj plialtigo de aĝo fare

de la aŭtoritatoj, vi estis devigita plu fuĝi en la printempo de 2019. La manko doloras. La infanoj demandas pri vi. Kion mi povas respondi?

13. *Jawad*, timigita kaj malĝoja. Kial neniu vidis la malĝojon malantaŭ via ridetanta buŝo? Vi diris al la personaro ĉe via loĝejo en Trollhättan, ke vi volas morti. Vi ne povis elteni la premon, la solecon, la streson kaj la atendon. Forprenis vian vivon unu nokton en 2017, nur 16-jara.

14. *Aliasghar*, vi dizertis el Sirio, vi estis devigita forlasi Svedion en majo 2018. Post 1 053 tagoj surstrate, vi finfine ricevis restadpermeson en Francio. Perfortita, minacita per tranĉilo, sen protekto kaj mono, sed vi ne rezignis. Batalis por la rajto vivi sen milito.



/Inga Johansson

La Aŭstria nacia biblioteko ricevas arkivon pri Esperanto



La Aŭstria Nacia Biblioteko (ÖNB) ricevis kiel donacon la kompletan arkivon de Universala Esperanto-Asocio. Tio estas unu el la plej ampleksaj kolektoj de la lingvo Esperanto – kaj do "riĉa trezoro".

Entute, la arkivo enhavas 158 kestojn enhavantajn librojn, manuskriptojn, afiŝojn kaj aŭdvidajn materialojn por la internacia Esperanto-movado. Tiuj ĉi ebligas ampleksajn historia-kultur-sciencajn kaj historia-filologiajn

esplorprojektojn pri la lingvo Esperanto.

Ankaŭ parto de la arkivo enhavas multajn dokumentojn pri la historio de Universala Esperanto-Asocio kaj la Esperanto-Muzeo de ÖNB kaj ankaŭ kolekton pri planlingvoj.

”Ĉi tiu riĉa trezoro estas nuntempe evoluigita por uzo de la Planlingvo-kolekto de la Aŭstria Nacia Biblioteko kaj disponebla al interesataj legantoj”, diris la ÖNB. La Esperantomuzeo dokumentas ĉirkaŭ 500.000 objektojn kaj ĉirkaŭ 500 planlingvajn projektojn.

Monda federacio kun membroj en pli ol 100 landoj

Laŭ informoj, Universala Esperanto-Asocio, kun sidejo en Roterdamo, estas la plej grava



representanto de la internacia Esperanto-komunumo, kaj hodiaŭ havas membrojn en pli ol 100 landoj. Ĝi eldonas la revuon "Revuo Esperanto" kaj organizas konferencojn pri interlingvistikaj temoj kaj ankaŭ la ĉiujaran Universalan Kongreson de Esperanto.

La planlingvo, unue publikigita en 1887, devis ebligi tutmonde komprenon de ĉiuj kulturaj diferencoj kiel universala lingvo.

Dume, ĝi estas la plej disvastigita planlingvo. Oni taksas, ke estas 500 000 ĝis du milionoj da parolantoj. En 2004 la Hungara Scienca Akademio konfirmis, ke Esperanto estas vivanta fremda lingvo.

red, wien.ORF.at/Agenturen



La familio Winberg en Bengtsfors, okcidenta Svedio

Rakonto de Titti Hagström pri sia parenco el Dalio (Dalsland) kun ligo al Gotenburga Esperantoklubo.

Dum varma julia tago Titti Hagström kune kun ŝia edzo Ulf venis de Stokholmo al mi en Gråbo. Ili estis survoje al Malmö, sed volis doni al la biblioteko de Stannum aron de poŝtkartoj. Temas pri multjara esperanta korespondado inter membroj de la familio Winberg kaj esperantistoj diversloke en la mondo. Mi petis al Titti skribi artikolon pri siaj parencoj:

La Winberg-familio konsistis el sep personoj:

Patro Carl Hansson Winberg n. 1864 05-14 en Skulevik, paroĥo Foss. Mortis en Bengtsfors en aŭgusto 1944.

Patrino **Ida Kristina Hansson** Winberg n. 1867-04-24 en Gustavi-paroĥo, Gotenburgo. Mortis en Bengtsfors en



Dalio (Dalsland) = la helblua regiono.

majo 1962. La paro geedziĝis la 7/12 1890.

Filino **Agnes Viktoria** Winberg n. 1885 ekstergeedzeco (Carl estis patro de Agnes kaj patrino estis Maria Hanssson) kaj ŝi kreskis kun la ceteraj parencoj de la familio Winberg. La komplikaĵoj ĉirkaŭ tio preterpasis min, sed mi scias ke mia avino (duonfratino de Agnes) parolis pri Agnes kiel tre kara pli maljuna fratino.

Gustaf Winberg n. 1891 en Uddevalla. Gustaf elmigris al Ameriko ĉirkaŭ 1912 kaj aliĝis al la usona armeo kaj partoprenis la unuan mondmiliton. Gustaf mortis en la lasta tago de la milito en 1918.

Hedvig Winberg n. 1893 en Uddevalla. Mia avino.

Nils Winberg n. 1895 en Uddevalla.

Ludvig Winberg n. 1897 en Ertemark.



Titti kaj Ulf Hagström en la esperanto-biblioteko en Stannum, Gråbo.

Ida Amalia (Titti) Winberg n. 1904 en Ertemark.

Pri la familio oni rakontas, ke ili havis grandan societan vivon kun samideanoj (pacemuloj kaj politike interesitaj personoj).



De maldekstre: Carl Winberg, Hedvig Winberg, Ida Winberg, la frato de Ida Winberg, Lars kun sia familio (4 personoj), Gustaf Winberg kaj la guvernisto de Gustaf. Sidantaj de maldekstre: la filoj Nils kaj Ludvig.

Carl Winberg estis unu el kvin infanoj (due plej juna) de la instruisto Hans Johansson Winberg, n. 1812 en Skulevik, la paroĥo de

Foss, kaj Sofia Amalia Eriksdotter, n. 1825 en Råhed, Svarteborg.

Carl laboras kiel ĉambelano (aŭ simile) ĉe EKA (Elektrokemiska aktiebolaget)* en Bengtsfors. Kian edukon li havis mi ne tute certas.

Mi ankaŭ ne certas, ĉu estis Carl aŭ lia edzino Ida, kiu estis la plej mova forto por instrui Esperanton al ĉiuj iliaj infanoj.

Carl kaj Ida parolis pri si kiel "civitanoj de la mondo". En la ĝardeno de ilia bela hejmo en Bengtsfors estis florbedo formita kiel Esperanta stelo. Carl estis bonkonata afabla viro kiu deziris la plej bonan kaj por homoj kaj bestoj.

*) Elektrokemiska Aktiebolaget, EKA:

<https://www.bengtsfors.se/sidor/uppleva-och-gora/turista-i-bengtsfors-kommun/eka-miljorum/historia.html>



Carl Winberg sidas dekstre de la esperantoflago.



Ĉi tiu bildo montras multe pli aĝan Carl Winberg.

Ida Kristina Winberg estis edukita bazlerneja instruisto, sed estas neklare kiom longe ŝi praktikis la profesion. Ŝi iĝis patrino frue kaj poste naskis kelkajn infanojn kaj la granda familio postulis ĝian parton. Kion mi scias kaj kio estas dokumentita kaj rakontita estas ke Ida havis grandan socian engaĝiĝon kaj ke ŝi iĝis la unua ina ano de la komununa deputitaro de Bengtsfors kaj membro de la pormalriĉula estraro, kie ŝi aktivis dum 15 jaroj. Ŝi havis ardan intereson por neprofitocela laboro ene de la kontraŭalkohola movado kaj la pacmovado.

Ida estis tre engaĝita en la balotrajtomovado, tio estas, en la laboro por virina balotrajto.

Kun ŝia socipolitika kaj soci-utila engaĝiĝo, Ida ricevis mandaton reprezenti la social-demokratojn en la magistrato en Bengtsfors

jam antaŭ 1919 (kaj la enkonduko de balotrajto por ĉiuj virinoj).

La deirpunkto estis la tiel nomataj "malsatotumultoj" (1917), kiuj plejparte estis efektivigitaj laŭ iniciato de virinoj sub la slogano "manĝaĵo, pano kaj terpomoj sur la tablo".

Gustaf Winberg, n. 1891. Estas rakontoj pri Gustaf sed ili ne estas kontrolitaj, kaj nun ekzistas neniu lasita vivanto, kiu povas rakonti pri li.

Li elmigris al Usono en tre juna aĝo. Li sukcesis iĝi amerika civitano, kio signifis ke li partoprenis flanke de Ameriko en la unua mondmilito.

Laŭ informo, li estis mortigita en la lasta tago de la milito, 11 novembro 1918.

Gustaf estis nur 27-jara. Granda malĝojo en la familio.

Hedvig Winberg n. 1893 – mia avino. Same kiel ŝiaj gepatroj, Hedvig estis aktiva praktikanto de Esperanto.

Antaŭ ol ŝi edziniĝis, ŝi akompanis sian patron kaj poste sian pli junan fratinton al diversaj kongresoj. Hedvig trapasis la abituriantan ekzamenon en Uddevalla en 1912 kaj iĝis la unua studento tie.



Titti maldekstre kune kun Ida Winberg (Titti).

Ŝi pensis, ke ŝi volis esti apotekisto, kio signifis staĝon en apoteko tuj post diplomiĝo.

La trejnado estis komencita sed ne kompletigita pro sanproblemoj. Anstataŭe, ŝi spertis trejnadon por iĝi bazlerneja instruisto kaj ricevis sian unuan instrupozicion en Viksjöfors en Hälsingland.

Alveninte per la trajno de Dalsland ĝis Alfta, Hälsingland, ŝi trovas la amon en la stacia asistanto Hans Andreas Edvall. Ili geedziĝis en 1919 kaj en 1920 ili iĝis gepatroj de Maj, mia patrino, kaj poste al Lasse n. 1922.



Juna Hedvig, dekstre. Antaŭ ŝi sidas Titti.

Hedvig havis grandan kaj pasian intereson pri sociaj aferoj, kio ankaŭ estis videbla en ŝia laboro kiel instruisto.

Dum ŝia tuta vivo ŝi estis arda historia rakontanto (ekde sveda kaj monda historio ĝis blagoj el ŝia elkresko en okcidenta Svedio). Ŝi estis ankaŭ pli-malpli aktiva praktikanto de Esperanto dum sia tuta vivo.



Hedvig en la 50a jardeko.

Nils Winberg n. 1895 trejnis kiel policisto, kiu iĝis lia profesio por la resto de lia vivo en Gotenburgo.

Li edziĝis al Augusta (Gussi) Lann kaj ricevis kvar infanojn – Berit, Vollmer, Hans kaj Marianne. Nils ankaŭ estis por tempo sveda ĉampiono en arta naĝado. La intereso pri naĝado estis io, kion li dividis kun la tuta familio. Pluraj estis tre bonaj naĝantoj. Estas

neklare kiom multe Nils partoprenis en la evoluo de Esperanto.

Ludvig n. 1897. Restis en Bengtsfors kaj havis, interalie, kiel profesion veturi la vaporŝipon sur la Dalsland-kanalo.

Ludvig estis edziĝinta al Anna Maria Gustavsson kaj ili havis kvar infanojn – Inga Maja, Karl-Gustaf, Anna-Lisa kaj Nils Gunnar. Estas neklare ĝis kia grado Ludvig praktikis Esperanton.

Ida Amalia (Titti) Winberg n. 1904. Titti longe vivis en la hejmo de siaj gepatroj en Bengtsfors, sen mencii ke ŝi verŝajne neniam vere forlasis la hejmon. Ŝi edziniĝis malfrue en la vivo al Birger Rosell kiu tiam estis vidvo kun filino, kiu havis la saman aĝon kiel Titti kaj kiu ankaŭ estis kara amiko de ŝi.



Titti staras dekstre.

Lige kun la morto de patro Carl en 1944, kaj Titti kaj Birger translokiĝis al patrino Ida, kiu havis grandan domon en la mezo de Bengtsfors.

Kiam Birger mortis en 1956, Titti malsaniĝis je nervoj kaj restis tiel dum la resto de sia vivo en diversaj periodoj kaj post la morto de Ida en 1962, Titti translokiĝis al Hälsingland kaj miaj geavoj, kie ŝi vivis por la resto de sia vivo.

Titti estis nekredible agrabla kaj delikata persono. Ŝi estis bona pianisto. Ŝi havis multajn interesojn, kiuj ĉirkaŭiris kaj komenciĝis de Esperanto.

Ŝi konservis la korespondadon en Esperanto dum sia tuta vivo. Ŝi estis vera amanto de homoj kaj bestoj kaj, same kiel ŝiaj gepatroj kaj pluraj gefratoj, sincera amanto de paco.



Titti sidas plej antaŭe. Mia patrino Maj kaj ŝia plej juna frato Lars malantaŭe kaj mia avino Hedvig staras.

Fotoj kiuj rilatas al mia infaneco estas jenaj:




Titti staras kune kun mi kaj mia fratino apud la florbedo, formita kiel esperanta stelo.



Kafofesto en Bengtsfors kun maljuniĝinta Ida plej maldekstre, poste mi mem kaj mia patrino Maj. Birger Rosell (edzo de Titti) kaj Titti mem, kaj ekvideto de mia fratino Ewa kun kato sur la genuoj.



I "Esperantorörelsen i Göteborg 1892–1992" kan man läsa: "Göteborgs Esperantoförening hade under året haft en livlig verksamhet. 23 protokollförda möten hölls under perioden 1932–1933. Einar Adamsson höll talrika föredrag i skilda ämnen, föredrag hölls även av Carl Vinberg, John Svantesson och Johan Hilmersson. Mötena hölls bl.a. hemma hos paret Adamsson och på olika caféer i Haga, t.ex. på Café Stugan på Landsväggsgatan 5. Man höll tre samkväm under året, däribland ett i december på Bangatan 24, där bl.a. Henrik Seppik, Einar Adamsson, Nils Vinberg och Käthie Stromeyer medverkade i programmet."



Titti Hagström rakontas ke la familioj Winberg (la nomo estis literumita per V, sed oni skribis W) kaj Adamsson ofte vizitadis unu la alian.

Ni en Esperanto-Societo de Gotenburgo aprezas ricevi rakontojn pri personoj, kiuj kontribuis al la Esperanto-movado en Gotenburgo kun ĉirkaŭaĵo.

Grandan dankon al Titti Hagström! /Siv



Poŝtkartoj al Carl (1912), Titti kaj Ida, sed pliaj membroj de la familio ankaŭ ricevis poŝtkartojn (de Usono, Belgio, Britio, Japanio, Francio, Germanio k.a.) Se oni skribis tro sur la dua flanko de la karto, oni metis la

poŝtmarkon sur la bildon. Se temas pri leteroj, oni ofte sendis poŝtmarkojn. Ŝajnas esti hobia ĉe multaj. Poŝtkartojn el la 50a jardeko oni enmetis en la skribomaŝino. Tiaj tekstoj estas ja facile legeblaj. /Siv

Se vi intencas starigi paroligan realan kurson aŭ zoom-kurson – vi povus provi "Kion ni lernis el la vivo?"

Temas pri proverboj, troveblaj en Esperanto, en la finna kaj la sveda, de Lauri Rytkönen.



Antaŭparolo

Ĉi tiu eldonaĵo "Vivo instruas" estas traduko al Esperanto el la sveda/finna kolekto de proverboj, komentoj kaj similaj opinioj. "Livet lär / Elämä opettaa".

Rezervo por mankoj en provlegado kaj tradukoj.

Tradukinte mi uzis ofte tradukilon, "Google Translate". La ŝajne malĝustajn tradukojn mi provis korekti laŭ mia eblo. Se vi rimarkas evidentajn erarojn en la teksto, mi tre dankas, se vi sciigas min pri ĉi tiuj, al retadreso Info@livet-lar.se.

Majo 2022

Lauri Rytkönen

Pri la kolekto "Vivo instruas"

La materialo konsistas el temoj, kiuj ĉefe estas prenitaj el diversaj kolektoj de citaĵoj aŭ opinioj, kiujn mi legis aŭ aŭdis kaj al kiuj mi aldonis sufiĉe multaj de miaj propraj observoj, pripensoj kaj konkludoj.

La ordo en ĉi tiu proverba kolekto estas intence tute hazarda, sen iu ajn provo kategoriigi ilin laŭ temo aŭ alimaniere.

Proverboj estas ofte perceptataj kiel kliŝoj, antaŭ ol mi mem persone komprenis la mesaĝon kaŝitan en ili. Proverboj, aforismoj estas kutime speco de paraboloj, kiuj povas esti aplikataj al tute malsamaj aferoj kaj eventoj.

Tial mi reformulis grandan parton de la proverboj por apliki al mi, vi aŭ ni. Eble, povas esti helpema por vi eltrovi kio povas esti la vera intenco de la subesta (sube estanta) mesaĝo.

La celo de ĉi tiu kolekto de proverboj estas doni kialon por pripensado kaj kontemplado. Tial, estas pli bone, ke vi legu la opiniojn reflektante kaj trankvile, kaj ne tro multe samfoje.

Inter la "proverboj" estas pluraj similaj deklaroj, sed tiuj plej ofte havas malsaman perspektivon, tiel iomete malsaman vidon.

Mi pensas, ke multaj el ĉi tiuj observoj, saĝecoj kaj deklaroj povus helpi vin pli bone kompreni kial homoj kondutas en certaj manieroj en malsamaj situacioj. Vi eĉ povus uzi kelkajn el ili kiel gvidilon en via vivo.

Aldone al tio, vi ankaŭ povus refreŝigi diskutojn per, en kunteksto taŭgaj, diraĵoj.

Ĉi tiu kolekto de proverboj haveblas ankaŭ en sveda lingvo < livet-lar.se > kaj ankaŭ en la finna lingvo < livet-lar.se/fi >.

(Bonvolu noti! Se vi legas ĉi tiun retejon per via poŝtelefono, certigu, ke aŭtomata traduko estas malŝaltita. Estas risko, ke la tradukita teksto estas malĝuste reproduktita!)

Se vi havas komentojn pri ĉi tiu kolekto de "observaĵoj" kaj proverboj, bonvolu sendi ilin al mi. Kontakto: info@livet-lar.se, (ligilo malsupre.)

Se vi konas iun, kiu povus interesiĝi pri proverboj kaj ĉi tiaj "observaĵoj" de la vivo, tiam kopiu kaj sendu ĉi tiun ligilon

<https://www.vivo-instruas.net/> al li aŭ ŝi.

Lauri Rytkönen 2021

Ideo pri proverboj

de Lauri Rytkönen, el Finnlando, sed loĝanta en Habo, Svedio



Ideo. Eble ankoraŭ estas homoj, kiuj eble interesiĝas kaj volas lerni Esperanton. Tiuj ĉi mallongaj "observaĵoj" en tri malsamaj lingvoj, **Esperanto**, la **sveda** kaj la **finna** povas esti helpemaj por pliiĝi la lingvan komprenon kaj vortprovizon.

Kion ni lernis el la vivo?

Observaĵoj pri vivo kaj realeco kaj saĝacoj de vivo por pripensi.

Mitā olemme elämästä oppineet?

Havaintoja elämästä ja todellisuudesta sekä elämäntapa- ja mieltämyönteisiä mietittäväksi.

Vad har vi lärt oss av livet?

lakttagelser om livet och verkligheten samt livsvisdomar för att begrunda.



Kelkaj specimenoj el la enhavo

Sperto estas nomo, kiun ni donas al niaj eraroj.

Maljuniĝo estas transiro de pasio al kompato.

Estas mensogoj, kiuj estas pli kredindaj ol la vero.

Modesteco estas virto sed vi povas iri plu sen ĝi.

Konscienco estas interna voĉo avertanta min, ke iu povas vidi.

Organiza kapablo estas, ke vi rapide decidas kaj laborigas iun alian.

Kion ni homoj alte taksas en ĉi tiu mondo ne estas rajtoj, sed privilegioj.

La optimisto verŝajne same ofte eraras kiel la pesimisto, sed li pli amuziĝas.

Memcentra homo havas malbonan guston, interesiĝas pli pri si mem, ol pri mi.

Se mi ne havus miajn proprajn kulpojn, mi ne estus tiel feliĉa rimarki ilin ĉe aliaj.

Via pozicio en la socio estas difinata de tio, kion homoj parolas pri vi malantaŭ via dorso.

Recesio (=ekonomia krizo) estas kiam mia najbaro ne havas laboron. Depresio kiam mi mem fariĝas senlaborulo.

Muutamia näytteitä sisällöstä

Kutsumme kokemuksiksi tekemiämme virheitä.

Vanheneminen on siirtymistä intohimosta myötätuntoon.

On valheita, jotka ovat uskottavampia kuin totuus.

Vaativattomuus on hyve – mutta pääset pitemmälle ilman sitä.

Omatunto on sisäinen ääni, joka minua varoittaa, että joku voi nähdä.

Organisointikyky on, että päätät nopeasti ja saat jonkun muun tekemään työn.

Se mitä me ihmiset arvostamme tässä maailmassa eivät ole oikeudet, vaan etuoikeudet.

Asemasi yhteisössä määräytyy sen mukaan, mitä ihmiset puhuvat sinusta selkäsi takana.

Optimisti on varmaan yhtä usein väärässä kuin pessimisti, mutta hänellä on haus Kempaa.

Itsekeskeisellä henkilöllä on huono maku, kiinnostunut enemmän itsestään kuin minusta.

Jos minulla itsellä ei olisi omia vikoja, niin minulla ei olisi niin suurta iloa huomata niitä muissa.

Taantuma on, milloin naapurini on työtön.

Lamakausi silloin kun minä itse joudun työttömäksi.

Några axplock ur innehållet

Erfarenheter är det namn vi ger åt våra misstag.

Åldrande är en övergång från passion till medkänsla.

Det finns lögnar som är trovärdigare än sanningen.

Blygsamhet är en dygd – men du kommer längre utan den.

Samvetet är en inre röst som varnar mig för att någon kan se.

En optimist har nog lika ofta fel som en pessimist, men han har roligare.

Din position i samhället bestäms av vad folk pratar om dig bakom din rygg.

En självcentrerad person har dålig smak, intresserad mer av sig själv än av mig.

Det vi människor sätter värde på här i världen är inte rättigheter, utan privilegier.

Lågkonjunktur är när min granne står utan jobb. Depression när jag själv blir arbetslös.

Organisationsförmåga är att du snabbt beslutar dig och får någon annan att göra jobbet.

Om jag inte hade mina egna fel skulle jag inte ha så stort nöje av att märka dem hos andra.

/Lauri

Ĉu vi volus aŭskulti tutan libron en delikataj pecoj?

Se jes – "La Verdkata Testamento" de Raymond Schwartz certe plaĉos al vi. Malavare Stano Marĉek permesas al ni senpage legi la klasikan libron, kiun li mem laŭtlegas. Koran dankon de Ora Ĵurnalo al vi Stano! /Siv



Verdkata Testamento (re!) deos Raymond Schwartz. Voĉlegita versio de la tuta libro. Legas Stano Marĉek. Martin, 2010. 245 mb, suma daŭro: 132 min. Eblas elŝuto en 1 pakaĵo de 228 mb, suma daŭro: 117 min – entute estas 62 ĉapitroj.

Iru al jena retadreso, de kie vi povas elŝuti la unuopajn ĉapitrojn aŭ la tuton:

http://stano-auskultejo.bplaced.net/index.htm/#Verdkata_Testamento

Alia sonlibro – Plupo kaj la gruoj

Plupo kaj la Gruoj en Esperanto (La Plena Sonlibro) – YouTube


https://www.youtube.com/watch?v=aVtjQ3V_gWg



La Esperanto-klubo de Lubumbaŝo dankas...

Du monatojn post ĝia fondiĝo en Lubumbaŝo, suda parto de Kongo-Kinŝasa en provinco Haut-Katanga (Alta Katango) la Esperanto-klubo de Lubumbaŝo ĵus ricevis donacon de lernolibroj senditaj de la Universala Esperanto-Asocio. La pakaĵo konsistis el dek Poŝamikoj, tri Esperanto per Rekta Metodo kaj kvar La Zagreba metodo.

Nun en nia klubo oni lernas en bona kondiĉo danke al la libroj. La kluba membronombro fluktuas, sed vidiĝas progreso ĉar la lingvo estas amata de multaj vizitantoj pro tio, ke ĝi estas facilege legebla, oni legas ĝin kiel la Svahilan lingvon. Ĝia gramatiko facila, multaj vortoj similas al francaj. La literoj "Ĉ kaj Ŝ" en la svahila oni skribas "Ch, Sh" do tute kongrua al la anstataŭliteroj por ĉapilitaj esperantaj literoj, svahilparolanto scipovas legi "shato", same en la svahila.



Do, estas plej facile por svahilparolantoj legi esperanton. Sur la bildo staras Espoir NGOMA KASATI, la instruisto, kaj la klubofondinto kaj sidas gelernantojn kun libroj en la manoj. Se vi ankaŭ volas ekspedi periodaĵojn, lernolibrojn, poŝvortarojn aŭ alispecajn lernilojn, bonvolu sendi ilin al jena adreso:

Espoir Ngoma Kasati

B.P. 1023

Kongo-Kinŝasa

urbo:Lubumbashi

Telefonnumero: +243 972 716 042, aŭ kontakti la klubestron per:

espoirkasati@gmail.com

Espoir NGOMA KASATI.

Koncerto kun "World Music Culture Club" ĉe Nääs

Krom la sinjordomo (aŭ palaco) Nääs, pri kiu Selma Lagerlöf skribis en "La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson", troviĝas multaj aliaj domoj. Unu havas artajn ekspoziciojn kaj je ties mallonga flanko estas scenejo. La publiko sidas sur eta amfiteatro el ligno, kafumante aŭ manĝante glaciaĵon. Sur la lago apude, boatoj preterpasas.

La muziko havas radikojn el suda Afriko kaj el la vermlandaj arbaroj. Araba junulo ludis la gitaron kaj kantis en pluraj lingvoj – la angla, la portugala, la araba, la franca – kaj la sveda.

Lia patrino ankaŭ kantis, kombinante arabajn kaj svedajn kanzonojn. Knabineto ludis tamburojn, uzante ambaŭ manojn kaj ambaŭ piedojn. La gvidanto ludis elektronikan pianon kaj li sukcesis kantigi la publikon (The lion sleeps tonight, Hold my heart k.a.) Li eĉ dancigis kvinonon el la publiko.

Sur la afiŝo staris: "Koncerto kun revoj pri kuna mondo, kie ĉiuj povas partopreni".

Interrete vi povas trovi Bröderna Bäck, la iniciatoroj de la koncerto. Ili ludas la

saksofonon (Anders Bäck) kaj la elektronikan pianon (David Bäck) – (Bäckbröderna, the

Bäck Brothers). /Siv

Jen kelkaj bildoj:



Pliaj pioniraj virinoj



5. Alexandra Gjestvang-Lindh (1882–1939), la unua virino en Svedio kiu sukcesis ricevi konduklicencon (jam en 1907).

En 1904 (antaŭ ol ŝi havis konduklicencon) Alexandra partoprenis la unuan svedan

aŭtokonkurson. La distanco estis ĉirkaŭ 170 km (Stokholmo–Upsalo, tien–reen) en Parcifal-aŭto. En Väsby okazis al kunkonkursanto akcidenton. La viro rompis al si la brakon kaj havis cerboskuon.

La Gjestvanga aŭto interrompis la konkurson kaj venigis la viron al hospitalo.

En 1905 ŝi kune kun aliaj fondis la "Skerma ina klubo de Stokholmo."

En 1932 ŝi kondukis Hudson-aŭton je la Monte-Carlo-ralio kune kun sia filo, Bo Lindh (la bildo). Ili atingis la celon kiel la 8a. Neniu alia sveda aŭto atingis lokon sur la konkurso.

En la 1930-aj jaroj Alexandra fariĝis la vicdirektoro de la entrepreno de sia patro, Gjestvang & Companio – post studadoj pri aŭtofabrikado kaj aŭtovendado en Francio kaj Usono.

Honore al ŝi la Aŭtomobilhistoria klubo ĉiun jaron aranĝas "sinjorinan ralion". /Siv

6. Selma Lagerlöf (1859–1940)



La unua virino, kiu ricevis la Nobel-premion pri literaturo en 1909. La unua virino en la Sveda Akademio (1914).

Selma Lagerlöf elkreskis en la sinjorlando

Mårbacka en Vermlando. Ŝi estas la kvina infano el ses de leŭtenanto Erik Gustaf Lagerlöf. Sur la dekstra foto ŝi estas 23-jara.

En 1882 ŝi komencis studi en Stokholmo ĉe "Högre Lärarinneseminarier" (por fariĝi instruistino). Ŝia patro kontraŭis tiun decidon. Li forpasis en 1885, kiam Selma finis sian studadon. La familio fariĝis malriĉa kaj devis vendi Mårbackan.

Kune kun Sophie Elkan, Selma faris plurajn vojaĝojn en Eŭropo. Post vojaĝo al Proksima Oriento ŝi verkis la romanon "Jerusalemo", pro kiu ŝi akiris sian internacian renomon.



La plej internacie konata libro estas "La Mirinda vojaĝo de Nils Holgersson". Origine ĝi estis mendo de la supera lerneja administracio: Skribu geografian lernolibron! Per tiu libro ni spertas la svedan geografion tra la rigardo de 14-jara knabo (Nils Holgersson), kiu sur la dorso de ansero flugas super la lando.

7. Emilia Fogelklou (1878–1972)

La unua virino kiu fariĝis kandidato pri filozofio en Svedio. La unua virino kiu fariĝis kandidato pri teologio en Svedio. La unua virina honordoktoro pri teologio en Svedio.



- 1906 kandidato pri filozofio je kvin fakoj: literatura historio, religia historio, pedagogio, teoria kaj praktika filozofio
- 1909 kandidato pri teologio
- 1941 honordoktoro pri teologio

Pri Emilia Fogelklou en Wikipedia:

En majo 1902, kiam Fogelklou sidis sur benko sur Föreningsgatan, Gotenburgo, ŝi ricevis vizion, kiu formis ŝian vivon, lumon kiun ŝi interpretis kiel "La Granda Kompato". Ŝi sentis sin liberigita kaj la timo malaperis.

Fogelklou laboris kiel instruisto dum 20 jaroj kun paŭzoj por plua edukado. En 1922 ŝi geedziĝis kun la kultura geografiisto Arnold Norlind. Ili havis nur sep jarojn kune, Norlind mortis en 1929. Fogelklou publikigis la libron "Arnold" en 1944.

Kun la nova jarcento venis nova vido de infanedukado en la spirito de Ellen Key, kiu allogis Fogelklou. Post tio, ŝi komencis pluedukadon en la Universitato de Gotenburgo.

En 1911, ŝi akceptis instruoficon en la komunuma lernejo de Djursholm, kie

Natanael Beskow estis rektoro. Interalie ŝi instruis pri kristanismo kaj luktis kun la ortodoksa instruplano. Beskow, kiu forlasis la ŝtatan eklezion kaj foje predikis en la kapelo de Djursholm, subtenis ŝin.

Fogelklou estis engaĝita edukisto kaj la studentoj aprezis ŝin. Ŝi volis, ke la lernantoj pensu libere kaj prenu respondecon.

En 1916, al ŝi estis ofertita instruista posteno ĉe la nova popolmezlernejo ĉe Birkagården, Stokholmo. Birkagården iĝis dua hejmo por Fogelklou.

En 1906 ŝi translokiĝis al Upsalo kaj fariĝis kandidato pri filozofio en kvin fakoj en unu jaro: literaturhistorio, historio de religio, pedagogio, teoria kaj praktika filozofio. Ŝi daŭre faris religiajn studojn ĉe Nathan Söderblom kaj diplomiĝis kiel la unua virino en teologio en 1909.

Ŝi ricevis stipendion de la Fondaĵo Olaus Petri por studoj pri "aktualaj filozofiaj movadoj" en Anglio, Francio kaj Italio. En 1930, per stipendio de Sweden-America Foundation ŝi studis sociologion kaj aplikatan psikologion en la Universitato de Kolumbio.


Fogelklou estas la unua virino en Svedio kiu kandidatiĝis pri teologio en 1908. Ŝi havis neniun ambicion iĝi pastro, sed argumentis ke virinoj devas havi aliron al tiu ofico.

Ŝi preferis skribi kaj instrui kaj iĝis kristana instruisto en la geinstrua lernejo de Djursholm (1911–1916). Fogelklou volis transdoni kaj klarigi la plej internan esencon de religia sperto. Ŝi estis serĉanto kaj mistikulo kaj ĉiam preta por dialogo kun aliaj pensuloj.

8. Greta Johansson (1895–1978)

La unua sveda virina orgajninto je naĝsaltoj en OS 1912.

- 1908 gajnis sian unuan naĝkonkurson.
- 1912 Olimpa oro je altaj saltoj de virinoj (10 metra)
- 1910 kaj 1912 sveda ĉampiono pri 100 metra rapidnaĝo
- 1911 kaj 1912 sveda ĉampiono pri rektaj saltoj
- 1912 olimpa kvarono kun aliaj svedoj je 4x100 metra
- rapidnaĝo



Greta Johansson elkreskis en Stokholmo. Ŝia patro laboris kiel portisto. Ŝi frekventis la lernejon Klara folkskola dum sep jaroj, kaj estis bona studento. Ŝi estis unu el la malmultaj studentoj en Stokholmo kiuj studis la anglan. Ŝi frue komencis montri intereson pri naĝado kaj naĝsaltoj. Ŝi estis trejnita de Lisa Regnell pri naĝado, kaj jam en 1908 ŝi gajnis sian unuan naĝan konkurson. Tamen inaj atletoj kutime ne havis trejniston por helpi.

Johansson gajnis oron en la alta rekta trampolinsalto de sinjorinoj (10 metroj) en la Someraj Olimpikoj de 1912 kaj tiel iĝis la unua olimpika ormedalisto de Svedio

Post la kariero Greta Johansson elmigris al Usono en 1914 post edziĝo kun la profesia

naĝanto Ernst Brandsten. Kune la paro estis aktiva parto de la disvolviĝo de naĝado en Usono.

La dokumenta filmo *Guld-Greta (Ora Greta) – mirinda amrakonto* de 2016 sekvas la vivon kaj karieron de Johansson. /Siv

Vakcinado

El nia serio de rakontoj de **Aira Kankunen**. El *Kaj tiam floris la ĉerizarboj...* (1997).

Ofte oni parolas pri pasintaj bonaj tempoj. Tamen multaj aferoj estas nun pli bonaj ol iam malnovatempe. Ni pensu pri vakcinado. Malnovtempe oni lanĉis i.a. la ĝeneralan kontraŭvariolan vakcinadon kaj tio estis bone farita, ĉar per la vakcinado preskaŭ plene oni forigis tiun danĝeran malsanon. La vakcinado vere estis ĝenerala. En la paroĥaj registroj estis notoj ne nur pri naskiĝintoj, mortintoj kaj konfirmacioj, sed ankaŭ pri diversaj okazaĵoj i.a. pri vakcinadoj. Sed kiam mi asertas, ke la vakcinado nun estas rimarkeble pli bona, mia aserto baziĝas sur miaj propraj spertoj. Nuntempe estas vakcinataj la unujaraj infanoj. Tiam la doloro estas eltenebla. La infano laŭtkrias, kiam la injektila nadlo pikas tra la haŭto, sed tuj ĝi forgesas. Alie estis malnovatempe. Tiam oni variolvakcinis la malpli junajn infanojn. La infanoj timatendis la vakcinadon. Ĝi tamen apartenis al tiutempaj suferoj kaj ĉiu estis vakcinata. Oni ne multe parolis pri ĝi anticipe, nur oni diris, ke la vakcinistino venos kaj la etuloj devas bonkonduki.

Du knabetoj promenis bone lavitaj kaj vestitaj per festtagaj vestoj. Oni atendis la vakcinistinon, kiu estis alvenonta kiam ajn. La familianoj miris pri la ĝentileco de la knaboj, kiuj estis ekstere por iri renkonte al la vakcinistino. Klare videblis la rezulto de bonedukado. Bezonokaze obeemaj estis ankaŭ la plej viglegaj knabetoj. Sed la celo de

la atendado estis tute alia, kvankam ili havis iomete da ĝentileco – ili estis honestaj.

Ne estis multe da trafiko survoje. La renkontatoj estis konataj. Facile estus rimarki la vakcinistinon, kiu estis ankaŭ la akuŝistino de la vilaĝo. De tie ŝi ja venis trankvile pedalante sian biciklon.

– Bonan tagon, knabetoj! Vi estas ĉi tie. Ni eniru.

– Bonan tagon! Ni ne eniros, la knabetoj diris samtempe kaj daŭrigis:

– Panjo diris, ke oni vakcinis nin, sed ne necesas. La vakcinistino ridetis. Kutimis, ke la infanoj protestis. Ŝi lasis sian biciklon ĉe la muro kaj eniris. La knabetoj staris observante la vakcinistinon.

Samtempe kiam ŝi fermis la pordon, ili ekkuris direkte al la arbaro. Ili decidis resti tie ĝis la vakcinistino foriros. La distanco de la domo ĝis la arbaro estis ĉirkaŭ 50-metra. Stangobarilo apartigis la korton disde la arbaro. Neniu kradpordego troviĝis en la stangobarilo, sed la knabetoj trarampis. Sed – la malpli juna fiksiĝis inter la stangoj tiel firme, ke li ne povis plu iri. La frato, kiu sukcesis, provis helpi sian kompatindan fraton, sed li ne sukcesis.

La familianoj vidis tra la fenestro, kiam la vakcinistino alvenis kaj je sia ĝojo ili vidis, ke



la knabetoj ĝentile salutis la venantinon. Kiam ŝi eniris, la patrino demandis:

– Pri kio la knabetoj babilis?

– Ili diris, ke ne estas necese vakcini ilin, kvankam panjo tiel diris.

– La knabetoj forkuras! ekkriis unu el la fratinoj. La tuta familio kaj la vakcinistino vidis la forkurantojn, kiuj rapide malaperis malantaŭ la kromdomo. La trankvilo finiĝis kaj komenciĝis postkurado. La fratinoj kuregis kaj – ilia ĝojo ne havis limojn, kiam ili trovis la forkurintojn, la ploranton malantaŭ la stangobarilo kaj la fiksiĝinton inter la stangoj. Estis facile kapti la viktimon. La pli juna ne forkuris sola, sed li – tamen malvolonte – sekvis sian fraton hejmen. La tuta familio ridis, sed la knabetoj ĉagreniĝis. La humiliĝo kaj la ridado de la aliaj personoj ofendegis la memrespekton de la knabetoj. La plenaĝuloj ĉiam venkas, ili pensis.

La fratetojn tuj poste oni vakcinis, sed ili ne forgesis la malfeliĉan finon de la forkurado. Ili nur atendis sufiĉan tempon por kompenci sian humiligitan sperton. Fine la tempo venis, kvankam nur post kelkaj jaroj, kiam la du plej junaj knabinetoj atingis la aĝon de la vakcinado.

– Nun estas via vico, la frato diris al siaj fratinetoj. La akuŝistino venos kun hakilo kaj hakos truojn en viaj brakoj tiel ke la sango ŝprucos kaj tio multe doloros vin.

La okuloj de la fratinetoj estis rondaj pro timo. Panjo ja diris, ke la vakcinistino venos kaj ili devos bonkondukti, kaj oni ne provu forkuri.

– Ni provis forkuri, sed ni estis kaptitaj kaj sekve vakcinitaj. Per la hakilo ŝi havis truojn en la brako. Ĉu vi ne kredas? Ĉu mi montru?

La frato kuspis la manikon. Ho ve! Kia teruraĵo! Tie estis cikatroj, ses cikatroj bone videblaj, kvankam li estis vakcinita antaŭ longe. Kiaj la truoj estis en la komenco? Feliĉe

la brako estas sur sia ĝusta loko. Kaj nun – nun ankaŭ ili devos travivi la vakcinadon. Estas malfacile kompreni, ke la akuŝistino, kiu estas afabla, vizitante, ankaŭ iradas havante hakilon sur sia ŝultro por vakcini infanojn. Oni neniam povas scii, kion la homoj faras – neniu estas fidinda. Kial la plenaĝuloj tiamaniere punas la infanojn? Panjo diris, ke ili, kiuj estas vakcinitaj, ne malsaniĝos je veziketo. Antaŭ longe ni havis la veziketon, rubeolon. Ĝi ja ne estis terura. Oni povus tute bone ree malsaniĝi. Panjo diris, ke ekzistas ankaŭ tiom danĝeraj veziketoj, ke la homoj mortas. Tamen – la vakcinado estas sufero, kiun la plenaĝuloj okazigas. Tiel la knabinetoj diskutis.

La vakcintago venis. La forkurado, kiun la frato proponis, ne sukcesis. La tutan tagon iu ĉeestis. La brako doloris, kiam ili nur pensis pri la hakilo. La vakcinistino alvenis kaj mansalutis kiel kutime. Ŝi ne havis hakilon sur sia ŝultro, sed – ŝi havis saketon. Certe la hakilo estas en la saketo, diskutis la knabinetoj.

– Ni tamen provu forkuri, interparolis la knabinetoj.

Ili ne povis iri eksteren, sed ene troviĝis sufiĉaj kaŝejoj. La pli juna rampis sub la ŝrankon kaj la malpli juna malantaŭ la lulseĝon. Kiam la vakcinado devis komenciĝi, la knabinetoj estis malaperintaj. En la granda familio ĉiam estis postsekvantoj. Iu el ili eksteris, kvankam ĉiuj pensis, ke la etulinoj devas esti ene. Oni traserĉis ĉiujn konatajn kaŝejojn kaj fine oni trovis la etulinojn. Kaj – la plenaĝuloj ree ĝojis, sed la knabinetoj ne ridetis. La vakcinistino sidis jam ĉe la tablo kun la saketo malfermita. Sur la tablo, sur la pura tuko estis malgrandaj boteloj, vato, vundogazo kaj stranga metalileto, kiel tranĉilo. Sed – kie estas la hakilo? Ĉu ĝi estas sub la tablo?

– Ĉu la malpli juna venu unue? demandis la vakcinistino ridetante.

Kial vi ridetas, pensis la "viktimino" akompanante malvolonte sian patrinon. Feliĉe panjo ĉeestas. Ŝi certe ne lasos dishaki la brakon. La knabineto observis ĉiun manmovon de la vakcinistino. Ŝi unue lavis la brakon per malseka vato, gutigis kelkajn likverojn sur la lavitan lokon kaj skrapis per metalilo. Mi ja sentas la skrapadon, sed apenaŭ doloras. Ĉi tion mi bone suferas, sed kiam ŝi prenos la hakilon, tiam mi ekkrios, pensis la etulino.

– Ĉio estas preta. Ne metu la manikon sur la vakcinitan lokon. Unue ĝi devas sekiĝi, diris la vakcinistino.

Sed – la hakilo! Ŝi volis pridemandi la vakcinitinon, sed vidante apud la ĉambropordo sian ridetantan fraton, ŝi ne demandis. La eta fratino ricevis tamen kuraĝigon:

– Tio ne doloris. Nur iomete da sango fluis. Vidu! La hakilo estis tre, tre malgranda kaj eĉ malakra. La vakcinistino devas skrapi per ĝi.

Urbopromeno en Gotenburgo kun Ingegerd kaj Lasse Granat kiel gvidantoj (16 julio). 18 personoj partoprenis. Siv fotis.





Albumo de urba promeno en Gotenburgo 16 julio 2022

Tie ĉi li staras kaj atendas la grupon kiu batalas por la Esperanta lingvo. Li esperas, ke la grupo sukcesos. Gustavo II Adolfo scias ke la kompreno inter homoj estas tre, tre grava ...Turkoj, rusoj, kroatoj kaj aliaj homoj ekster Svedio babilas terure – nekomprenablajn vortojn! Galimatio!



Gotenburgaj esperantistoj, kolektiĝu je la 13:a horo!
"Staru en atentpozio" la reĝo diras.



"Hisu la flagojn por la Gotenbarga kulturo!"





Gardantoj por **Diligenteco**, **Feliĉo** kaj **Paco** – **Merkuro**, simbolo de komerco, **Neptuno** kiu zorgas pri la martrafiko, la **Riĉeco** ne ĉiam aldonis feliĉon, kaj laste, la **Industria Diino**.



Ĉio estas farebla se oni volas.
Tiuj bronzaĵoj pruvis tion.
Tio ebligis per granda monkoklekto.

La amo inter Johanna en Brunnsparcken kaj Gustavo II Adolfo sur Gustav Adolfs Torg estas tre videbla por iuj kiuj havas fantazion. Ili elserĉas unu la alian sed estas kaptitaj sur la statupostamentoj.



La reĝo Karolo la 9-a kaj la peza ĉevalo gardas trezoron interne de la postamento. Brandon troviĝas en la kavaĵo de la statuo.



Bastionsplatsen en la judaj kvartaloj de Gotenburgo.

Memoriĝu, memoriĝu!

Neniam forgesu la holokaŭston!

La ebriaj batalistoj ne havas prudenton!
Ĉu ili scias pri kio la batalo temas?
Mi vere pridubas!





La Vermlanda Inĝeniero.

John Ericsson estis portretita en malinda maniero, li aspektis ŝrumpita kaj grumblema kaj ankaŭ liaj pantalonoj estas sulkiĝintaj!

Estis kritikaj civitanoj kiuj levis siajn voĉon kaj kritikis.

La 6-an oktobro 1899, dum inaŭguro pluvegis!
La ĉielo ploris pro la skulptisto Ingel Fallstedt. Li frue mortigis sin mem pro la kritiko kaj ne estis partoprenanto de la festaĵo.



Charles Felix Lindberg estis granda donacinto al Gotenburgo.

En sia testamento li donis la tutan heredaĵon al la ornamado kaj plibeligo de la Gotenburga medio.

Dankon al vi, Charles Felix Lindberg!

Ingegerd

Inbjudan till ZOOM-kurser

Esperanto-föreningen i Göteborg planerar två ZOOM-kurser med början vecka 36.

För nybörjare

Onsdagar kl. 18.15–19.15

Ledare: Siv Burell

Fortsättningskurs

Måndagar kl. 17–18

Ledare: Nick Kalivoda

I båda kurserna använder vi läroboken EPOGO (Esperanto Por Gimnazianoj), som

kostar 100:– + frakt. I övrigt inga kostnader. Fortsättningskursen börjar på kap. 12, dit vårens nybörjare kom. Du, som redan har en del esperantokunskaper kan ju läsa in kap 1–11 på egen hand och vara med i fortsättningskursen.

Frågor och anmälan till siv.burell@gmail.com

Välkomna!

Nick och Siv

